

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
MARZEC 1927 MARTO

Nr. 3. N-o

CZTERDZIEŚCI LAT PRÓBY.

U PŁYWA czterdzieści lat od daty, gdy w Warszawie ukazała się drukiem pierwsza książeczka o języku międzynarodowym D-ra Esperanto. W związku z tem zamierza świat esperancki uczcić pamiętną i historyczną dla siebie datę. Wyłoniła się jednak w prasie dyskusja, który dzień roku przyjąć za właściwy moment dla ewentualnego uroczystego obchodu. Jedni wskazują na datę cenzury rosyjskiej, inni ją odrzucają dowodząc, że ukazanie się książki w druku i handlu jest późniejsze niż zezwolenie cenzury, trzecia zaś grupa radzi połączyć bliżej nieokreśloną datę narodzin oficjalnych języka międzynarodowego z datą urodzin jego autora, przypadającą na dzień 15. grudnia, którą cały świat esperancki obchodzi w postaci wieczorków Zamenhofowskich.

Zostawiając na uboczu rozstrzygnięcie tej kwestji, z innego punktu spójrzmy na ten okres w rozwoju języka Esperanto, okres wzrostu i dostosowania się do warunków napotkanych na drodze rozwojowej. Otóż, najbardziej zasadniczem pytaniem jest, czy język ten w ciągu 40 lat swego istnienia okazał się tworem ustabilizowanym, a *eo ipso* w budowie doskonałym? Niewątpliwie tak. Poza jedną drobną zmianą, a właściwie poprawką, dokonaną zresztą przez samego Zamenhofa w rok po ukazaniu się pierwszej broszurki o języku międzynarodowym, polegającą na zastąpieniu przysłówka czasu *kian* przez *kiam*, by uniknąć zbieżności z IV. przypadkiem zaimka *kia* — cały język Esperanto okazał się niespożytą budowlą na trwałej wzniesioną opoce, która przez lat 40 swego istnienia i rozwoju żadnych nie wykazała luk, szczerb, niedociągnięć, wad, nie zaszła żadna potrzeba przeprowadzenia jakichkolwiek zmian, poprawek lub uzupełnień. W istocie swej Esperanto dzisiejszy jest identyczny z Esperantem 1887 roku. Okoliczność ta jest bardzo znamienna i wielkiej wagi. By należycie ją ocenić, trzeba uwzględnić, że przez te 40 lat język Esperanto wywędrowawszy z Warszawy odbył pochód przez wszystkie kraje, przeniknął do wszystkich

narodów; ludzie najrozmaitszych ras, języków, poziomów cywilizacyjnych i kulturalnych zaczęli przyswajać sobie Esperanto i wszyscy, jeśli go dobrze poznali, przyswoili go sobie w sposób jednakowy, tak, że swobodne ustne porozumienie się esperantystów na całym świecie stało się realnym faktem, absolutnie pewnym, bo miljonkrotnie sprawdzonym i ciągle dalej stwierdzanym. Pod tym względem Esperanto okazał się przewyższającym wiele innych języków naturalnych, które mimo ustalonego od stuleci słownictwa, gramatyki, fonetyki, mają skłonność do odchylania się od właściwego wzoru, a w dalszym następstwie przeradzania się w dialekty. Wystarczy wspomnieć o języku angielskim w Londynie a New-Yorku lub Chicago; dialekty niemieckie w Berlinie i Wiedniu są różne, podobne zjawisko da się stwierdzić na terenie języka francuskiego, włoskiego i innych. Ta okoliczność była powodem, że wiele osób miało wątpliwości, czy Esperanto nie rozpadnie się też na dialekty. Dotychczasowe jego istnienie wykazało płonność tych obaw: Esperanto w ustach dobrego esperantysty w Warszawie, Tokio, San-Francisko czy Melbourne brzmi jednakowo zrozumiale. Nie trzeba dodawać, że tembardziej jednakowo wyglądają teksty esperanckie pisane w którychkolwiek krajach czy częściach świata. Esperanckimi stylistami okazali się zarówno Polacy, jak Niemcy, Anglicy, Francuzi, Japończycy, Chińczycy, Jawajczycy, Brazylijczycy i t. d. i t. d. Wymiana utworów literackich czy poprostu wymiana myśli pomiędzy wszystkimi narodami przy pomocy Esperanta stała się faktem.

Gdy się zatem okazuje, że penetracja Esperanta do wszystkich krajów i narodów nie pociągnęła za sobą żadnych istotnych zmian w jego budowie, to czy nie spowodowało tego zastosowanie i wprowadzenie go do różnych dziedzin życia intelektualnego? Dzisiejszy bowiem Esperanto nie ogranicza się do prymitywnych rozmówek, wierszyków czy powiastek — przeciwnie po latach 40 swego istnienia przeniknął do wszystkich dziedzin pracy ducha ludzkiego, zwycięsko wkroczył w dziedzinę sztuki i opanował najtrudniejsze formy prozy, eposu, liryki, komedji i tragedji, zarówno w formie tłumaczeń, jak i utworów oryginalnych. Esperanto przeniknął do wszystkich działów nauk ścisłych i stosowanych i na każdym terenie umiał sprostać powstałym zadaniom zawsze pozostając sobą pod każdym względem. Jako język, jako narzędzie wyrażania myśli ludzkiej Esperanto okazał się doskonałym i niezawodnym. Dlatego też ci, którzy go dobrze znają, nie tylko korzystają z niego, ale go cenią, kochają i dla jego przyszłości pracują, bo widzą w nim wspaniały plód geniusza ludzkiego i cywilizacji, któremu sądzonem jest odegrać wielką rolę w historii ludzkości: zbliżyć, jeśli nie zbratać różne dziś często wrogie sobie narody.

Dr Jan Mędrkiewicz, Lublin.



JAN KOCHANOWSKI.

EL LA „P L O R K A N T O J “ (T R E N Y).

KANTO VI.

ĜOJIGA KANTISTINO, HO VI SAFO SLAVA,
 DE VI MIA BIENO SUFIĈA KAJ GRAVA
 KAJ ANKAŬ LA LIUTO ESTIS HEREDOTA!
 KIA ESTIS ESPERO JE VI HAVIGOTA!
 ĈAR LA NOVAJN VI ĈIAM KUNMETIS VERSETOJN
 KAJ KONSTANTE ELPENSIS LA NOVAJN KANTETOJN.
 LA NAJTINGAL' EN VERDA TRILAS ARBETAĴO,
 JEN ĜI LEVAS TUTNOKTE GORĜON AL ALTAĴO.
 TRO FRUE EKSILENTIS VI, ĈARMA FILINO,
 VIN MORTO JAM FORPELIS, MIA KARULINO!
 OREL' MIA NE SATA JE VIAJ KANTĈARMOJ,
 KAJ LA IOMON NUNE MI PAGAS PER LARMOJ.
 KAJ JEN VI EĈ MORTANTE NEK ĈESIS KANTETI,
 NEK ĈESIS, LA PATRINON KISANTE, BENETI:
 „JAM NE PLU MI VIN SERVOS, HO PATRINO MIA,
 „NEK MI EKSIDOS ĈE VI APUD TABLO VIA;
 „MI DEVAS LA ŜLOSILOJN FORMETI KAJ IRI,
 „HEJMON DE LA GEPATROJ PLUE NE DEZIRI...“
 JEN ESTIS LASTAJ VORTOJ DE MIA FILINO,
 PLION NE LASAS DIRI DOLORO SEN FINO.
 AŬDINTE ADIAŬON LA PATRINA KORO
 APENAŬ ĜI PLU VIVIS PRO EGA DOLORO.

TRADUKIS PASTRO JAKÓB MAKARA, JAROSŁAW.

POPOLAJ ELTRANĈAĴOJ.

La pola popolo montras denaskajn kapablojn al poezio, muziko kaj plastikaj artoj. El la trezorejo de popola kanto kaj muziko ĉerpis plenmane la plej grandaj polaj poetoj kaj majstroj de tonoj. Malpli konata estas la popola talento al pentr-kaj skulptarto; interese do estas ankaŭ ĝin ekkoni, ĉar ĝiaj produktoj estas ne malpli belaj kaj rimarkindaj. Nia popolo ŝatas ornamojn kaj belajn objektojn. La internon de siaj kabanoj ĝi ornamas per multaj bildoj, per pentritaj kaj skulptitaj mebloj. La blankajn murojn kaj fornojn ĝi kovras per koloraj floroj, folioj, branĉoj kaj bukadoj pentritaj mane aŭ kun helpo de patronoj eltranĉitaj el diverskoloraj paperoj. Tiuj ornamaĵoj surmuraj, nomataj pole „wycinanki“, estas faritaj aŭ el unukoloraj aŭ delikataj multkoloraj paperetoj. La plej ofte renkontata estas ornamo geometria kaj kreskaĵa, malpli ofte besta (kokoj, fantaziaj birdoj), tre malofte figura. Uzataj estas paperoj de ĉiuj koloroj, ne esceptante la blankan kaj nigran, en ĉiuj eĉ plej delikataj nuancoj. Preferataj estas koloroj varmaj, vivaj, kaj en la kunmeto de koloroj, apud milda kunfandiĝo de tonoj, la kontrastaj koloroj estas precipe ŝatataj.

Ĉiu regiono de la lando havas sian propran tipon karakterizan pro aparta ornamaĵo kaj precipe ŝatata elekto de koloroj. La eltranĉaĵo estas intime ligita kun la tuta plastika arto de koncerna ĉirkaŭaĵo: oni renkontas en ĝi motivojn uzatajn ĉe la pentritaj ovoj kaj kestoj, broditaj korsaĵoj, ornamitaj mebloj kaj iloj. Ĝi kreiga en la animo de vilaĝa artistino el ŝiaj denaskaj estetikaj eksentoj, ŝi uzas certajn hereditajn formojn kreitajn dum jarcentoj sub la influo de ĉirkaŭaĵo kaj vivrilatoj, en kiuj kreskis kaj disvolviĝas iu pola gento. Tial la popola ornamarto estas tiel diversa kaj la plastikaj verkoj en diversaj regionoj multe diferenciĝas inter si. La eltranĉaĵojn faras grandaparte la knabinoj kaj virinoj; la viroj malpli ofte partoprenas en tiu laboro. Ĉiu vilaĝo havas kutime unu aŭ kelkajn specialistojn precipe kapablajn kun alta artista sentemo kaj riĉa fantazio, lertajn kaj paciencajn al tiu delikata verkado. Ili kreas ofte mirindajn verkojn de ornamarto, ne trapasante tamen la limojn de iuj formoj propraj al la koncerna regiono. Pro tio, kvankam ĉiu eltranĉaĵo estas alia, kvankam neniam oni trovas du identajn, ĉar ili ne estas farataj laŭ modeloj, tamen aperas precize iu unu tipo, unu karaktero. La fantazio de tiuj verkantinoj estas tre granda; la sama vilaĝa artistino scipovas fari kelkdekon da eltranĉaĵoj diferencaj inter si, eĉ kiam ili estas faritaj el unukolora papero.

La eltranĉaĵojn oni faras kutime en la sezono libera de kampaj kaj mastrumaj laboroj, do dum la vintraj vesperoj, kiam ekstere blovas neĝvento kaj en la varma kabano ĉe la kameno oni tiel agrable revas pri ĉarma printempo, pri sunplena somero kaj pri la kamplaboroj meze de bela,

ridetanta naturo. Tiam la sopiranta knabino prenas grandan, maldelikatan tondilon kaj eltranĉas florojn je ĉielarkaj koloroj, birdetojn kun oraj flugiloj, multkolorajn bukedojn kaj florkronojn. La tuta poezio de l' naturinfano, la revoj de simpla koro kaj malkuraĝaj flugoj al la suproj de pura belo respeguliĝas en tiuj verkaĵoj.

Seweryn Udziela

Direktoro de Muzeo Etnografia en Kraków.



WŁADYSŁAW ST. REYMONT.

SUPER LA ABISMO.

(D A U R I G O).

— Vi ankaŭ ne scias, kio okazas?

— Mi ne scias, preĝas nur pri la venko de l' prava afero — li flustris evitante lian rigardon.

— Prava afero! Kaj vi timas, ke ni malvenkos...

— Ĉio estas en la manoj de l' sorto. La konsilantaro atendas vin, sinjoro.

— Ĝi atendu la hakilon, kiel mi atendas! Sklavoj!

— Vi volis ilin havi tiaj, sinjoro!

— Kiu ne indas homecon, kolĉe-non indas kaj bastonon!

— La danĝero estas proksima, oni devas decidi ion...

— Ĝi venu! Mi atendas ĝin... Foririru... — Li ekkriis fiere, trapenetrante lin per sovaĝa rigardo.

— Mi atendas cin, amasaĉo! Ci mortigos, se ci min venkos, sed se mi venkos, mi dispremos cin kiel vermaron, enforĝos cin per tiaj katenoj, ke ci neniam plu leviĝos! Hor-doĵ fiaj! — li flustris, minacante tien en la nokton, kie la brulbriloj komencis ekflori, kvazaŭ malproksimaj aŭroroj. Li iris en la profundon de l' kastelo.

La pordoj malfermiĝadis antaŭ li senbrue, la servistaro klinis obeeme la nukojn, la gvardioj prezentis la armilojn, la oficiroj kun nudigitaj sabroj elpaŝadis antaŭen kun timo, sklavaj okuloj faladis al liaj piedoj kaj rampis post li.

Li rigardis ĉiujn rimarkante neniun, tiris sin kiel ombro velkinta en varmego kaj kiel ombro postlasadis ĉirkaŭe malĝojon funebran kaj timon, tamen li svingis senkonscie la manon kaj ili malaperis, kvazaŭ subteriginte, kaj li iris la senfinan amfiladon de salonoj, kvazaŭ dezerton superversitan per lumo kaj supersutitan per lukso de la tuta mondo, meze de riĉaĵoj rabitaj de ĉiuj popoloj.

La tapiŝoj surdigis la bruon de l' paŝoj kaj li iris kvazaŭ en silento de tomboj. Kaj iafoje li haltadis ĉirkaŭrigardante per timema kaj raba okulo. Li estis sola, nur la grandegaj speguloj ripetadis lian fieran figuron, grizan, klinitan kapon kaj pezajn movojn....

Li forturnis sin nevolonte de la propra bildo kaj iris ĉiam pli rapide, kaj tra la malplenaj salonoj kuris post li eĥoj de liaj ekĝemoj, surdaj krioj de rigardoj kaj kvieta malespero tremetanta en la ŝtona koro.

Li iris ĝis la eksteraj kortoj cirkaŭitaj per potencaj muroj, trapaŝis kristalajn galeriojn, palmarojn, longajn tunelojn de oranĝejoj, kie la floroj elspiradis svenigajn odorojn, kie susuris arĝentaj fontanoj, kaj aroĵ da birdoj kvazaŭ multekostaj ŝtonoj kantis en la verdaj densaĵoj. Ĝi estis kvazaŭ sorĉa arbaro el mil kaj unu noktoj, sankta arbaro dediĉita al la dioj de l' ĝuo kaj silento, kie la animoj lacigitaj per la bruo de l' vivo povis ebriiĝi per ĉarmo de misteraj flustroj, brilaj koloroj, odoraj birdaj, nediveneblaj triloj...

Sed li preterpasis kvazaŭ tra dezerto kaj indiferece piedpremis la florbedojn, ĉar tie malsupre, malantaŭ la kristalaj vitroj kuŝis kortoj plenplenaj da liaj sklavoj, flagris la fajroj de tendaroj, brilis armiloj, fumis la kaldronoj, kaj la surdigita bruo bolis timeme inter la gigantaj muregoj.

Kun kortuŝo li alrigardis la longajn batalajn kolonojn, starantajn senmove; ili estis jam pretaj, streĉitaj al salto, kiel hundoj, atendis nur signon, por sin ŝeti kontraŭ la malamiko kaj morton porti...

Li suriris la balkonon, de kiu ĉiam li montriĝis al la armeoj.

Oni ekvidis lin en la sangaj brilaj de l' fajrujoj, kelkcent sabroj ŝvingiĝis supren kaj kelkcent gorgoj ekkriis.

— Miaj ili estas! Certaj kaj fidelaj! pereos por mi! Sed ĉu venkos?

Li pensis retiriĝinte subite en la ombron, ĉar ekŝajnis al li, ke iu paŝilo kliniĝis kvazaŭ al pafo.

Kaj denove li vagis kiel fantomo en la netraireblaj muroj de l' kastelo, malkvieto pelis lin de lok' al loko, tiel ke li pereadis pormomente en iaj koridoroj, trenis sin tra iaj salonoj malvarmaj kaj malplenaj, ĝis fine li supreniris la plej altajn terasojn pendantajn super la maro, kaj rigardante la nepenetreblajn krepuskojn de ŝaŭmanta akvaro li subaŭskultis la minacajn balbutojn kaj kiel blindigita birdo puŝfrapis je la malplenoj de senlima teruro kaj timo.

Tamen ankaŭ tie kaptis lin la maldolĉaj kaj teruraj pensoj, ankaŭ tie falis de li la orbrilaj ĉifonoj de majesteco, ankaŭ tie li tordiĝis en la homa sufero, kaj ankaŭ tie la sovaĝaj bedaŭroj sufokis lin je la gorgo kaj disŝiradis per la feraj ungoj la sentiman koron.

Kaj denove li forkuradis pluen pelate de la furioj de malkvietoj.

Ĝis fine li trovis sin senscie en la ĉambroj de sia edzino, tamen antaŭ ol eniri li longe kaj suspekteme rigardis tra la vitra pordo, tra kiu li vidis longan vicon da arkajitaj apartamentoj — ili brilis kvazaŭ miraklaj, oraj konkoj, ornamitaj per altprezaj juveloj.

Kelkdek personoj moviĝis en malheligita lumo, meze de floroj, orumaĵoj kaj arĝentaj speguloj.

Reĝa lustro plenigis tiun mirindan oazon, floroj staris ĉie,odoro de violoj saturis la aeron, neniue brutala eĥo alvenadis de la mondo, neniue bruo de batalo malkvietigis la dolĉan agor-

diĝon, la homoj moviĝis iaj feliĉaj, malplenaj je zorgoj kaj timoj, la lipoj ridetadis serene, mallaŭtaj voĉoj rondflugis kun miela brueto de abeloj, virinaj sopiroj, susuroj de veluroj kaj briloj de juveloj estis kvazaŭ spiretoj de l' floroj.

La muziko eksonis kiel malproksima, ĉarma brueto de lazuraj ondoj. Li kovris la vizaĝon per ŝtona masko de majesteco kaj eniris ridetante bonvoleme.

— Amuziĝu. Ne interrompu! — li parolis bonkore sidigante flanke. „Ŝi“ enrigardis en liajn okulojn demande.

— Ĉio iras plej bone. Ĉio! — li respondadis laŭte ridetante al la kortego, kiu ĉirkaŭis lin rapideme, al la sinjorinoj grandiozaj, al fraŭlinoj ĉarmaj, al junuloj eminentaj kaj al sinjoroj dignoplenaj....

La muziko defluis per nebulo da sonoj oraj kaj tremigantaj per tremo plezura, eabriĝis per haŝiŝa ĉarmo; dolĉaj voĉoj disigis kvazaŭ pluvo da floroj per odora nebulo de enpensigo kaj sopiro; ili saturis la animon per sonĝa sopiro, luletante ĝin ĝis memforgeso. La lumoj radiantaj de ie, lumoj plenaj je eabriĝaodoro dronigis la salonojn per arĝenta flagretanta nubo kaj sur la fono de oraj muroj kaj floroj kontrastis la marmoraj, nudaj korpoj de diinoj, kiuj estis kvazaŭ blanka, senmorta melodio de belo en tiu sorĉa ĝardeno de koloroj, sonoj, briloj kaj homoj.

Surdigita flustro de paroloj susuris kvazaŭ falado de sekaj, ruĝaj folioj. Flagretis la koloroj de vestoj, susuris silkoj, brilis juveloj, rondiris vortoj,flugis la rigardoj kiel mutaj, someraj

fulmoj, brulis lipoj purpuraj, faladis sopiroj, sed ĉies okuloj gardatendis ĉiun geston de Sinjoro, ĉar kien li rigardis, tie kliniĝis humile la kapoj, ekfloris ruĝbriloj kaj la animoj svenis en ĝoja atendado.

Kaj li per senmova, rigida pupilo trarigardis ĉiujn vizaĝojn, serĉis sub la maskoj de kortegulaj ridetoj la respeguliĝon de propraj suferoj kaj timoj, serĉis uraganojn, detruantajn la tutan mondon.

Ili estis trankvilaj, konfidis je lia forto kaj potenco.

Do ankaŭ li trankviliĝis malrapide kaj forgesadis, ke denove revenadis al li la eksento de lia estreco kaj regado, li leviĝis el marĉaj abismoj de teruroj, rektigis sin kiel akra, nerompebla glavo, kaj la venĝo komencis flustri al li dolĉajn esperojn.... pri l' venko....

Kaj jam favore li aŭskultis la flustrojn servutulajn, ĝoje aŭdis mensogajn himnojn de amo kaj kun plezuro dronis en sonoro de senenhavaj vortoj, laŭdantaj lian grandecon kaj potencon.

— Miaj ili estas kaj fidelaj! — li pensis trapasante malrapide de unu ĉambro en alian — kaj kiel suno fluis disŝutante je la kliniĝantaj kapoj favorojn da rigardoj kaj ridetoj kaj kiel suno semis ĉirkaŭe ĝojon, lumon kaj feliĉon — tiel, ke tiuj salonoj fariĝadis sanktejo, en kiu oni honoris lin kiel dion solan, estis altaro, sur kiu oni oferis al li adoron sanktan kaj senhaltan, kie la tuta mondo genuis antaŭ li enpreĝe...

Al liaj imperiaj piedoj fluis la homagioj de ĉiu homeco, al tiuj piedoj

kliniĝis humile popoloj almozantaj favoron de vivo... Tiel estis ĉiam, tiel estis dum liaj prapatroj kaj tiel estos dum liaj posteuloj kaj ĝis la fino de la jarcentoj.

Li pensis nun pri tio, kondukante la nebulitajn pupilojn tra la vizaĝoj nigraj, flavaj kaj blankaj, kiuj vagis ĉirkaŭe, tra la vizaĝoj de ĉiuj popoloj kaj rasoj subigitaj al lia regado.

— Kaj ĝis la fino de la jarcentoj! — li revis dolĉe, sidiĝante en la ombro de palmoj.

La amaso disŝutiĝis en la salonoj, la muziko eksilentis, la bruoj mutiĝis, la koroj kurbiĝis en la timo de atendoj, kaj li sidis sola kvazaŭ sur la trono de l' mondo, alte super ĉio, en la silento de potenco tiel, ke nur brilo de homaj rigardoj rampis ĉe liaj piedoj kiel la stelaj procesioj,

kaj iliaj voĉoj, iliaj ĝemoj, iliaj krioj petegaj fumis kun nekomprenebla kaj malproksima susuro de preterkurantaj meteoroj...

„Tiel estis ĉiam kaj tiel estos ĝis la fino de la jarcentoj“.

Li sonĝis ebriigan sonĝon pri potenco.

Subite la kadavra kaj moka vizaĝo de rememoroj enrigardis en la okulojn, li vekigis subite, ŝajnis al li, ke ia brutala, malvarma mano kuraĝis lin ektuŝi, kolero terura kaj nepardonbla tremigis lin.

— Kiu kuraĝis? Kiu? — li demandis per koleraj okuloj. — Se la oceanoj leviĝos kontraŭ mi — superŝuti ilin; se montoj — ebenigi; se popoloj — ekstermi kaj bruligi, kaj la cindrojn ĵeti en kloakojn!... Kiu kuraĝas?... (daŭrigota).



LINGVAJ PRIPENSOJ.

En la rimarko al mia problemo pri „kosta-malkosta“ s-o Redaktanto asertis — cetere ne sen praveco — ke mi iras en la direkto de oportuno koncerne la lingvan evoluon de Esperanto. Nu, mi ne neas, ke estas tiel. Komence de ĉi tiu monato mi ricevis de s-ano Grosjean Maupin, la direktoro de la sekcio pri Vortaro en la Esperantista Akademio, leteron, el kiu mi ĉerpas jenon:

„...nenio malpermesas, nenio malhelpas, ke vi uzu la vortojn *kosta*, *malkosta*, *nombra k. c.* samsignife kiel *multekosta*, *malmultekosta* k. t. p....“

„La Akademio oficiale rekomen-

dis la jenon (Of. Gaz. majo 1913): Se la ideo esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenebla el la kunteksto sen iu el la afiksoj uzitaj, tiu afikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj necesas“.

Sekve nia plej kompetenta oficiala vortaristo mem aprobis (private, ĉar oficiale li ne rajtis) la vortojn *kosta* resp. *malkosta*.

La titolo de ĉi tiu artikolo montras, ke mi neniel volas insisti, ke la malnova *malmultekosta* estu forĵetata. Mi simple montris, kiel ni povas ne enkondukante novajn radikojn plitaŭgigi la Zamenhofan lingvan materia-

lon. Se al iuj el ni ne plaĉas, ili povas resti ĉe sia preferaĵo. „Ni ĉiuj“, kiel prave skribas s-ano Grosjean Maupin, „ĝuas plenan liberecon: ni ne forprenu la liberecon de la aliaj“.

* * *

Mi proponis al la Akademio unuecigi la ĝis nun jam iom multe, sed tre konfuze uzatajn prefiksojn: *per-*, *tra-*, kaj *for-*. Mi proponas, ke anstataŭ *elflati*, *almiliti*, *militakiri* (la du lastaj kaŭzis siatempe la enkondukon de *konkeri...*), simile al *perlabori* kaj *perforti*, *per-* uziĝu kiel prefikso signifanta: *akiri*, ekz. anstataŭ *almiliti* oni uzu *permiliti* (ĝin jam enhavas la Vortaro esperanto-franca de s-o Grosjean Maupin), *perdanci* anst. *dancakiri*, *perludi* anst. *ludakiri*, *ludgajni* k. s.

Anstataŭ ke *traludi* signifu: *perdi en ludado*, kiel emas skribi slavlingvanoj, estas konsilinda: *forludi*, dum *traludi* ni povas ekz. nian liberan tempon, la tutan nokton k. s. Simile ni *trababilas* niajn lecionojn (lecionhorojn) kaj *forbabilas* la plej bonajn proponojn de la fervoruloj en la esperantaj kluboj...

Mono facile *perludita* estas multe pli facile *forludata*, ofte tre facile *fordiboĉata*.

Kelkaj knabinoj facile *perdancas* al si la edzojn, aliaj, malgraŭ ke ili *tradancadas* tutajn vesperojn kaj noktojn, ne sukcesas kaj pri ili ĉirkaŭiras la onidiro, ke ilia doto, iam tre granda, kun la tempo estis *fordancita*...

Eble ne ĉiuj vidas la utilon, kiun havigas tiaj mallongaĵoj. Tiuj trankvile uzadu la de si preferatajn: *perdi* en

ludado (*forludi*), *gajni* en la *ludo* (*perludi*), *pasigi* la tempon en *ludado* (*traludi*). Sed la event. proponon de kelkaj, ekz. *elludi* (anst. *perludi*) ni ne povus akcepti jam pro tio, ke *elludi* signifas: *finludi* aŭ bone, ĝisfunde *ludi*, kiel *ellerni*, *elkoni*. Tion ni devas memori.

Por pli klare difini mian ideon pri *tra-*kaj *for-* mi aldonas, ke tia signifo trudiĝas al ni precipe ĉe verboj kvaŭzaŭ netransitivaj. Tiaj verboj estas ekz. *danci*, *drinki*, *diboĉi*, *babili*, *militi*, *ludi* ktp. Kiam tiaj vortoj povas esprimi agon kiel rimedon por atingi iun celon, ili povas ricevi la prefikson *per*. Tiam ili same povas ĉiam esprimi ankaŭ la kontraŭon de celatingo: *perdon*, sekve ricevi ankaŭ la „perdafikson“: *for*.

Koncerne *tra-* klarigo ne ŝajnas bezona, ĉar delonge oni en Esperanto *travivas* belajn kongrestagojn, *tramarŝas* longajn vojojn ktp.

Sed kiam la verbo estas transitiva deorigine ekz. *puŝi*, *tiri*, *kuŝigi*, *preni*, *doni* ktp., la samaj prefiksoj signifas ion alian: *trapuŝi* = *puŝi tra*, *forpuŝi* = *puŝi for*, *perpuŝi* oni povas ne *ion*, kion oni fakte *puŝas*, sed *ion* alian, ĉar tiam *puŝi* fariĝas kvaŭzaŭ netransitiva verbo (komparu polan: *pchać się*) kaj kiu *perpuŝis* al si la *vojon*, *dispuŝis* ne la *vojon*, sed la *homojn*.

Kiaj eblecoj troviĝas en nia lingvo! Kiajn perspektivojn al ni promesas la estonta evoluo de Esperanto! Ĉu estas do bezone preni el aliaj lingvoj novajn radikojn?! Nia malgranda vortaro Zamenhofa certe enhavas ankoraŭ multe, multe pli gravajn tre-

zorojn, kiujn nia cerbo ankoraŭ ne kapablas eĉ antaŭsupozeti.

Je la fino unu rimarko:

La celo de tiu ĉi artikolo koncerne *tra-*, *for-* kaj *per-* estas ne simpla „akademia diskuto“. Mia celo estas alia: Ĉar pli aŭ malpli frue la formoj, kiujn mi proponas, estos per si mem vaste uzataj — tion pruvas la jam ekzistanta literaturo — tial troa pasiveco de la Akademio kaj la Lingva Komitato ne ŝajnas al mi konsilinda. Se la L. K. ne rajtas aprobi ion antaŭ ol ĝi estas tute ĝeneraliginta, ĝi almenaŭ rajtus konsili kiel uzadi tiun aŭ alian lingveron. La privata aprobo de s-o Grosjean Maupin por mi tute sufiĉas. Se forestas konsiloj de spertaj konantoj de la lingvo, ĉu ne estas timeble, ke la vivo enkondukos en Esperanton formojn, kiuj malgraŭ ĉio, ne devus esti enkondukitaj? La biologia evoluo de la aliaj vivantaj lingvoj mem, ĉu ĝi ne montris, ke la libera lingvevoluo estas ja iom tro... malgraŭvola? Ĉu ĉiam la „volo“ de l' amaso estu plej supera leĝo? Ĉu la amaso havas volon?! Kaj se ĝi ne havas volon, ni devus fariĝi sklavoj de la senvolo! En la pola lingvo „senvolo“ kaj „mallibero“ tradukiĝas per la sama vorto. Tiamaniere la libera evoluo kondukus al mallibero...

D-r Leopold Dreher.

*

*

*

Rim. de l' Red. Estimata Kunlaboranto kaj L. K.-ano permesu, ke ni denove ne plene konsentu kun liaj konkludoj. La proponata apliko de l' prepozicioj *per*, *tra*, kaj prefikso *for* kiel afiksoj ne estas novaĵo, sed prilargigo de ilia uzado je kelkaj pluaj, cetere frapante bonaj parolturnoj. La ebleco tamen uzi ilin en kelkaj nur esprimoj (la donitaj ekzemploj preskaŭ jam elĉerpas tiun eblecon) malnecesigas la enkondukadon de novaj, sufiĉe neprecizaj reguloj. Pli simple estus enkonduki la cititajn vortojn kun ilia proponata signifo en la vortaron kiel duonmemstarajn, same kiel tio havas lokon kun kelkaj aliaj kunmetaĵoj. La propono similas tiun pri *mis-*, por la ebleco uzi ĝin en kvar-kvin vortoj oni disverŝis maron da inko kaj post 20-jara uzado ne plene ĝin sukcesis ĝeneraligi!

Ankaŭ kun la rolo, kiun la estimata L. K.-ano dezirus altrudi al siaj institucioj, ni ne plene povas konsenti. Faŝismo ĉu bolŝevismo, kiel ŝtata principo, povas esti bona kaj eĉ iafaje saviga por la ŝtato, absolutismo tamen de iu eĉ plej aŭtoritata institucio en la sferoj de l' spirito, al kiuj apartenas la lingvevoluo, estas nerealigebla kaj ofte povus fariĝi malliberiga. La „malliberon“ pro „libera evoluo“ en Esperanto ni ne timas, ĉar ĝi okazas ne „senvole“, sed ĝuste kontraŭe tute „vole“; tion montras la 40-jara evoluo de nia lingvo, tion montras eĉ la artikoloj de D-ro Dreher, kiu plej „vole“ aperigas al ni novajn formojn!

Feliĉe la Akademio kune kun la L. K. ankaŭ la altrudatan al ili rolon ne akceptus.



NUR REKTE, KURAĜE KAJ NE FLANKIĜANTE.

La pollanda Esperanto-movado eniras nun sur novan vojon, espereble pli certan kaj firman. La Krakova konferenco, okazinta en Novembro de pasinta jaro, pruvis, ke en Polujo multaj koroj batas por nia nobla afero, kaj se niaj fortoj ne estis dum multaj jaroj profite uzitaj, la kaŭzo de tio estis ĉefe manko de centra organizaĵo, de tia centro, kien kunfluus kaj unuiĝus ĉiuj elementoj necesaj kaj kapablaj alporti utilon kaj profiton al nia movado.

La dolora problemo de la Esperanto-movado en Polujo estas fine bone solvita, sed provizore ĝi estas nur teoria solvo. Se ĉiu el ni, por kiuj Esperanto estas kara, almetos iom da bona volo por efektivigi tion, kion la novembra kunveno rezoluciis, se ni fine rezignos de niaj „ambicietoj“, unuanime celante ĉiuj kune la prosperadon de nia movado, tiam la plej grava unua paŝo estos farita, ĉar ni estos atingintaj pli aŭ malpli veran solidarecon en niaj vicoj, kaj nia agado estos des pli solida, ju pli unuiĝema estos la tendenco de la centra organizaĵo.

Jam nun ni povas kun ĝojo konstati la bonajn fruktojn, alportitajn

de la fakto, ke vera centra organizo estas fondita. Dank' al ĝia neŭtrala karaktero, ĉiu Esperanto-grupo povas interrili kun ĝi, kunlabori, helpi, kunagi.

Tio, bedaŭrinde, ĝis nun ne estis ebla, ĉar ne ekzistis en nia lando tia organiza instanco kun neŭtrala karaktero, al kiu ĉia grupo povus aliĝi. Verdire, ekzistis kaj ekzistas kelkaj asocioj, disvolvantaj sian agadon sur la tuta tereno de la Pola Respubliko, sed tiuj asocioj havas siajn difinitajn celojn kaj tendencojn, ne konfeseblajn de ĉiuj Esperantistoj.

La Ekzekutiva Komitato de nia centro konsistas el personoj, kiuj jam multfoje pruvis siajn spertojn, kapablojn kaj taŭgecon. Nun ĉio dependas de la Esperantistaro mem. Se ĝi konscios siajn devojn kaj celojn, nia movado firmiĝos. Ke ĝi emas plivigli la movadon, tion manifestis al ni la Krakow'a Konferenco.

La vojo, kiun ni elektis kaj ekiris, estas bona kaj solida. Ni do senhezite marŝu antaŭen laŭ devizo, kiun heredigis al ni nia Majstro:

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan.

» » » » » » » » » » » » » » » » *Ilo.*



ESPERANTISTA MOVADO.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

ABSTYNENTYZM. V. Ogólnoswiatowy kongres przeciwników palenia tytoniu, który odbędzie się w Pradze (6—8 lipca b. r.), ma zorganizowaną specjalną sekcję esperancką.

FILATELISTYKA. Pierwsze znaczki pocztowe esperanckie ukazały się w Z. S. S. R. jako przedruk: „Wynalazca radja Popov“ na markach ku czci tego uczonego (serja: 7 i 14 kopijek). Drugie, wydane również przez Sowiety, z okazji VI. Ogólnoswiatowego kongresu robotników-esperantystów w Leningradzie mają tekst i symbole: rosyjskie i esperanckie (wartości: 7 i 14 kopijek).

HANDEL. W ostatnich dniach kilka międzynarodowych targów wydało esperanckie afisze, prospekty, przewodniki i zaproszenia na tegoroczne wystawy. Z ważniejszych: Budapeszt (Szemere utca 6); Lipsk (Markt 4) i Lyon (Hôtel de Ville). Inne wydadzą niebawem. (A Poznań i Lwów!?!).

JARSTWO. „Liga jaroszy-esperantystów“ ma członków w wielu krajach świata, dla których wydaje miesięcznik „Vegetarano“ („Jarosz“).

KOLEJNICTWO. Oficjalny organ kolejarzy szwajcarskich „Kolejarz“, wychodzący dotychczas w trzech językach: francuskim, niemieckim i włoskim, wprowadził obecnie stały dział czwarty — esperancki.

MEDYCYNĄ. „Podręcznik esperanta dla lekarzy“ luksusownie wydany o 280 stronicach wyszedł obecnie w Japonii. Specjalne wydawnictwo tego rodzaju świadczy dosadnie o sile rozwoju esperanta wśród lekarzy japońskich.

NIEWIDOMI. We wszystkich prawie szkołach dla niewidomych na świe-

cie uczą esperanta. Liczba wydawnictw w poszczególnych krajach jest drobna z powodu kosztowności druku systemem Braille. Przed niewidomymi esperantystami stoi otworem literatura całego świata w tym języku. Mają też oni swój wszechświatowy organ, miesięcznik o 60 stronach pisma.

PACYFIZM. XXV. Międzynarodowy Kongres Pokoju w Genewie uchwalił, aby od r. 1931 wszystkie mowy narodowe tłumaczyć na esperanto.

PEDAGOGIKA. Międzynarodowe Biuro Wychowania zwołało na Wielkanoc (16—19 kwietnia) do Pragi konferencję w sprawie wychowania pokojowego. Na porządku dziennym jest: znaczenie nauki esperanta dla tej sprawy.

PRASA. Niemiecka gazeta „Das scharfe Auge“, poświęcona okulistyce, drukuje podtytuły i streszczenia wszystkich artykułów po esperancku.

RADJO. Kowieńska radiostacja nadaje po esperancku wiadomości, głównie propagandacyjne o Litwie, co środy i piątki o godz. 18 na fali 2000. (A Warszawa i Kraków?!).

SZKOLNICTWO. We Wiedniu odbyły się już trzykrotnie oficjalne egzaminy państwowe esperanta dla nauczycieli.

TURYSTYKA. Największe hotele w Budapeszcie wydają broszurki reklamowe po esperancku oraz umieściły we wszystkich pokojach napisy w językach: węgierskim, niemieckim i esperanckim.

UZDROWISKA. „Czeskie światowej sławy miejscowości kuracyjne i wycieczki w ich okolicę“ — oto tytuł książki wydanej świeżo po esperancku przez Czechów. Naszej propagandy — brak!

Sław.

POLLANDA KRONIKO.

BIELSKO. La 15. II. laŭ la invito de tieaj samideanoj faris s-o Tichawski el Katowice propagandan paroladon pri Esperanto.

DĄBROWA GÓRNICZA. La 13. III. okazis publika prelego de S-o M. Ziomek el Kraków pri „Esperanto kaj internacia proleta solidareco“; ĉeestis ĉ. 100 aŭskultintoj. Al la socia-politika kurso ĉe „Poalej Cijon“ estis aldonita Esperanto kiel aparta objekto; la instruadon gvidas s-o Izraelewicz.

KATOWICE. Generala jarkunveno de „Societo de Esperanto-Amikoj“ okazis la 4. I. en la hotelo „Do wypoczynku“. Nova estraro: S-oj Tichawski — prez., d-ro Sianożęcki — vicprez., Matyszok — sekr., Kloss — kas., Pasięcka — bibl., Faruga kaj Drzażdżyński — konsilantoj kaj revizoroj. Dum januaro finiĝis kurso kun 19. personoj, kaj la 17. II. komenciĝis nova kurso kun 17 pers., gvidata de s-o Tichawski. La 8. IV. okazos plena membrar-kunveno en la „Grand“ restoracio ĉe ul. Kościuszki 38, kie de nun estos la konstanta kunvenejo de la societo. Proksimaj kaj malproksimaj gesamideanoj estas kore invitataj.

KRAKÓW. La 10. III. en la ĉeesto de insp. Ludwikowski, delegito de la ĉefkomandejo de Stata Polico en Warszawa, vojvoda polickomandanto Pilch, komisario Ginzhuber kaj prof. d-ro Bujwid okazis en la Vojvoda Polica Komandejo ekzameno de la lernantoj de la polica lernejo pri Esperanto. S-o D-ro Dreher, kiu apenaŭ 5 semajnojn instruis, demandis la lernantojn en Esperanto; la lernantoj montris mirinde grandan komprenon kaj povis preskaŭ tute libere interparoli. La insp. Ludwikowski vidinte tiujn progresojn promesis subteni la instruadon de nia

lingvo ankaŭ en estonteco. La lingvo-kapablaj policanoj estos portantaj specialan verdstelan insignon simile kiel en aliaj ŝtatoj. La 13. III. de marto okazis en „Soc. Esperanto“ ekzameno pri kapableco. La ekzamena komisiono konsistis el s-oj Kuhl, D-ro Dreher kaj f-ino Weinsberg. Kun sukceso ekzameniĝis: s-ino Mazuraki (kun distingo), s-o Swaryczewski, f-ino Anisfeld, s-oj Heretyk, Leibel kaj Mayer.

OPATÓW KIELECKI. Nia nova kaj fervora pioniro, prof. Józef Żołnerek aranĝis kaj gvidas en la loka gimnazio kurson de Esp. Danke al la afableco de D-ro Dreher, kiu liveris al li lernolibrojn kaj propagandan materialon, li sukcesis ekinteresi lernantojn kaj lernantinojn kaj fondi ĉe „Memhelpa Rondo“ de l' gimnazio Esperantan Rondeton, al kiu apartenas 35 gelnantoj. En la plej proksima tempo intencas prof. Żołnerek aranĝi ankaŭ publikajn kursojn.

STAWISZYN ap. Kalisz. S-o Piotr Sterpak propagandas sukcese Esperanton, intencas enkonduki ĝin en la lernejon kaj fondi klubon.

STRZEMIESZYCE. La 13. II. faris prelegon pri Esp. s-o Czechowski el Sosnowiec. Sekve de tio fondiĝis en la sporta klubo esperantista grupo, en kiu s-o Janato Tatarka gvidas kurson kun 55 personoj; la anoj de la grupo konsistas precipe el fervoj-oficistoj kaj policanoj kun ilia komandanto.

WARSZAWA. Generala jarkunveno de la varsovia grupo de „Pola Esperantista Asocio“ okazis la 18. II. Post aprobo de la raporto de l' ek-siĝinta estraro oni elektis novan estraron: prez. — prof. E. Świecimski, vicpr. — D-ro A. Czubyński, kaj S. Essigman, sekr. — A. Stankiewicz, kas. — M. Kaus, bibl. — J. Günter;

aliaj membroj de l' estraro: S-oj Ferencowicz, Burkathówna, Pomorski, Grabowski, Wagnerówna kaj Trochimowski. La ĝenerala kunveno decidis 1) fiksi la kotizajon je 12 zł. jare, 2) aliĝi al la Pollanda Esperantista Delegitaro (P. E. D.), kun la deziresprimo, ke la ekzekutiva komitato baldaŭ kunvoku la Tutpollandan Konferencon de Esperantistoj al Warszawa kaj ke la sidejo de la Komitato estu de tiam en Warszawa. 3) „Pola Esperantisto“ restas organo de P. E. A. La 12. III. Pola Studenta Esp. Societo finis kurson por tramvojistoj. La lastan lecionon gvidis nia estimata s-o L. Ferencowicz, poste s-o M. Trochimowski parolis pri nuntempa stato de la esp.-movado, alvokante fine labori aktive kun la Tramvojista Rondo, studi Esperanton kaj observi la disvolviĝon de la esp. afero. Varsovia Esperantista Tramvojista Rondo (VETRO) ricevis de dir. Kühn, kiu estas tre favora por nia afero,

loĝejon, en kiu oni komencos baldaŭ gvidi novajn kursojn. Por solene festi la proksimiĝantan dekan datrevenon de la morto de nia Majstro la Varsoviaj Esperantistoj fondis tiucele specialan komitaton, en kiu eniris reprezentantoj de ĉiuj varsoviaj societoj esperantistaj en la personoj de s-oj: S. Essigman — prez., J. Dratwer — sekr., A. Stankiewicz, K. Berkman, J. Pudel, A. Górczyński kaj I. Koss. La komitato decidis: la 14. IV. en la tago de la datreveno de l' morto je la 13-a horo meti sur la tombon de l' Majstro unu florkronon, kiel simbolon de interesperantista unueco, en la nomo de ĉiuj varsoviaj societoj esperantistaj. La komitato turnas sin per tiu komunikilo al ĉiuj societoj kaj izoluloj en Polujo kaj eksterlando kun la peto partopreni la aranĝotan de ĝi Zamenhofan solenaĵon. Apartaj invitoj ne estos sendataj. Adreso por korespondadoj: S. Essigman, Marszałkowska 130, Warszawa.

K O M U N I K O J D E P. E. D.

Ministerio de Publika Instruado en Warszawa decidis liveri pasportojn al S-oj prof. Loth kaj d-ro Czubryński, kiel delegitoj por la Paska konferenco en Praha.

La estraro de la milita aviado instigis ĉiujn oficirojn-aviadistojn partopreni aranĝatajn por ili kursojn de Esperanto.

Danke al klopodoj de P. E. D. s-o Tichawski en Katowice ricevis la permeson funkcii kiel publika instruisto de Esperanto dum la jaro 1927 aŭ ĝis la ricevo de atesto pri

instruista kapableco de la fondota Pola Instituto de Esperanto. (En la Silezia vojvoda distrikto publike instrui iun ajn objekton povas nur personoj posedantaj ateston de instrua kapableco de ŝtate aprobita instituto; tio montras, kiom gravaj estas la klopodoj pri starigo de P. I. E.!).

La komitato de P. E. D. atentigas pri la preparata soleno de l' X. datreveno de morto de nia Majstro kaj petas la samideanaron laŭeble ĝin partopreni. Ĝi mem estos reprezentata en Warszawa per sia prezidanto.



B I B L I O G R A F I O.

Jaume Grau Casas. Novaj amaj poemoj. Barcelona 1927. Kiu studis la imponan kaj ĝis nun unikan en la esperanta literaturo verkon „Kataluna Antologio“, certe miris pri la majstre delikata eksento kaj kapablo traduke reprodukti la ĉarmon de tiu serena kaj sunplena literaturo. La enigmon solvas la nuna volumeto: Grau Casas estas mem poeto *Dei gratia*, kaj tial komprenas kaj scipovas tiom bone esprimi la sentojn de aliaj poetoj; tial tradukante scipovas enmeti iliajn verkojn en la senriproĉan kvankam tiel ofte sendankan formon de esperanta verso. Kaj de ili, sed ankaŭ ne nur de ili, ĉar tion li certe ĉerpas el sia profunda memo, li prenis la sudan, sunradian kaj sunhelan serenon, delikatecon kaj sincerecon de sentoj esprimataj en formoj tiel perfekte finitaj, kiajn en nia juna literaturo oni malofte renkontas.

Julio Baghy. Pilgrimo. Poemaro. Budapest 1926. Malbone ni skribis antaŭe, ke oni malofte en Esperanto renkontas perfektan poezian formon. Ĉar jen preskaŭ samtempe la poŝto alportis el alia flanko de Eŭropo volumon da poemoj, antaŭ kiuj ekĝenuu adore la poeziamantoj. Sed kiom granda diferenco inter ambaŭ poetoj. Grau Casas estas serena trobadoro de amo, Baghy — nerva infano de postmilita nuntempo kaj ĝiaj sociaj mizeroj. La pesimismo pro la homo kaj lia surtera rolo kaj sorto trovis en ĉi tiu kolekto da poemoj la plej profundan en la esperanta literaturo esprimon; ĉiuj ĝisnunaj „monddoloroj“, da kiuj aperis jam sufiĉe granda porcio, estas simpla ĉirpado kompare kun la dolorplena kanto de l' „Pilgrimo“. Cu la pesimismo de l' poeto

estas daŭra stato de lia psiĥo, mal-facile estas diveni — oni esperu tamen, ke li povos forskui en plua disvolviĝo la nigrokoloran mondridardon. Kiel moton li metis: „Komuna sort' de homo kaj homaro: pilgrimi de altaro al altaro...“

Diservon li nun plenumas antaŭ la altaro de nigra pesimismo. Post plua, verŝajne longa pilgrimado eble li trovos la altaron de serena kompreno de l' vivceloj. Tion pro la bono de nia literaturo ni kore al li deziras. *Baroko.*

Dr. Emil Pfeffer. Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Tagblatt-Bibliothek, Wien. Preskaŭ senmanka naci-esperanta vortaro, tre praktike verkita de nia Krakow'a samideano, nun loĝanta jam de longe en Wien. Senpartia recenzanto ne povas laŭdi la iom troan novvortigadon: asasino, klimi, lokalo, arozi, snufi ktp. Ĉu ne sufiĉas insidmortigo, suprenigi sin, ejo, aspergi, flarserĉi ktp.? La vortaro uzas *promiscue* tra- kaj for- laŭ la kutimo de slavlingvanoj kaj kelkaj aliaj nacilingvanoj. Ekz. *verprassen* estas laŭ ĝi *tradiboĉi*, sed ĉu la aŭtoro „tradiboĉas“ ankaŭ monon? Mi dubas. *Verblühen* ne povas tradukiĝi „transflori“, ĉar tio signifus „flori transe“, ĉu ne? Transflori, kiu signifus: „transiri en alian ol florado staton“, kiel intencas la aŭtoro, ne estas ankoraŭ en uzado. La plej fidela traduko de *verblühen* estas nur: forflori (uzita jam de Grabowski), ĉar nek „velki“ nek „forvelki“ reproduktas la *-blühen*, aliparte *forflori* estas analoga al *forbruli* (zgorzeć). Cetere la bonegco de la verko estas tute senduba kaj ni varme rekomendas ĝin al ĉiuj germanlingvaj uzantoj de nia lingvo.

Dr. L. D.



ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. PREMIO POR ABONANTOJ DE „POLA ESPERANTISTO“.

Pola Esperantisto donas al ĉiuj abonantoj, kiuj ĝis la 10/IV. tj. pagos 8 zł., kiel la tutan jarabonon lukse eldonitan libron de poeziaĵoj: Juliusz Kriss, „Melodioj de l' nokto“. Kiuj jam parte abonis, povas alpagi ĝis la supre skribita templimo je la tutjara abono. La jam abonintoj ricevas la premion kun tiu ĉi numero.

II. GARANTIA FONDO DE „POLA ESPERANTISTO“.

Pagis jam por Garantia Fondo de P. E.: P-o D-ro Bujwid por III.—30 zł., D-o Róbin por III.—20 zł., D-o Rosenstock por II.—10 zł., S-ino Neuberg por II.—10 zł., por III.—10 zł., S-ino Rubinstein por II.—10 zł., F-ino Weinsberg por II.—5 zł., Ing. K. Nawrocki (Polanka) 2 zł.

1. S-o Bronisław Kuhl pagas zł. 5'30 kaj alvokas sekvontajn samideanojn: S-o Direktoro Kostecki (Kraków), S-o D-o Mędrkiewicz (Lublin) kaj S-o Pfeiffer, vdel UEA. (Łódź).

2. S-o Leopold Kronenberg pagas 10 zł. kaj petas, ke sekvontaj gesinjoroj pagu laŭvolan sumon: Leo Belmont (Warszawa), D-o Blassberg (Kraków), N. Chlebosz, urba konsilanto (Kalisz), St. Essigman, del. UEA (Warszawa), M. Fluhr, komercisto (Tarnów), Salo Grenkamp (Paris), Emil Gernand, instruisto (Koluszki), Bol. Głuchowski, lernejdirektoro (Warszawa), St. Gaszyński, senatoro (Warszawa), M. Jasiński (Kalisz), D-o Tadeusz Henner, notario (Szubin), P-o St. Krasicki (Bydgoszcz), Jan Kronenberg (Łomża), Józef Litauer, advokato (Warszawa), Jakób Lustig, komercisto (Kalisz), Józef Orzech, gimnazia direktoro (Tarnów), Fr. Prengel (Bydgoszcz), Pastro P-o A. Rokosz (Rybnik), P-o Mieczysław Michalski, prezidanto de urba konsilantaro (Kalisz), N. Różanykwiat, komercisto (Warszawa), N. Sakowicz, prokuroro (Wilno), F-ino Nuśka Świeboska (Opatów Kielecki), Paweł Szczurek, prezidanto de ZPPTTRP (Warszawa), N. Tichawski, fervojoficisto (Katowice), Zofia Kronenberg-Trybułowa presejposedantino (Zakopane), Sual Wagman, redaktoro de „Nasz Przegląd“ (Warszawa).

3. S-o Emil Janczałek (Kraków) pagas 10 zł. kaj alvokas siajn gekonatulojn de „Tutpollanda Esperanto Konferenco“: D-o Dreher (Kraków), Arie Hoszowski (Stryj), Emil Kołodziej (Królewska Huta), Samuel Monderer (Andrychów), Luiza Nadlówna (Lwów), Leon Ringler (Borysław), Jakób Schapiro (Białystok), Henryk Schnützer (Lwów), Maurycy Sternberg (Kraków), D-o Sianożęcki (Katowice).

4. S-o A. Pakratz Sejmdeputito pagas 5 zł. kaj alvokas s-on Hinc, prezidanton de Esp. Societo de Bydgoszcz pagi minimume la saman sumon kaj alvoki aliajn gesamideanojn.

!! VIVU SEKVONTOJ !!

